

# pola

sendependa revuo  
de polaj esperantistoj

# esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 4/2005 ★ ISSN 0032-2431



Prezydent  
Rzeczypospolitej Polskiej

Warszawa, 31 lipca 2005 roku

Do uczestników 61. Światowego  
Kongresu Młodzieży Esperanckiej

Szanowni Państwo, Drodzy Młodzi Przyjaciele,

Serdecznie pozdrawiam wszystkich uczestników 61. Światowego Kongresu Młodzieży Esperanckiej. Z satysfakcją objąłem nad nim honorowy patronat.

Język utworzony przed ponad wiekiem przez warszawskiego lekarza, doktora Ludwika Zamenhofa, powstał po to, by ułatwić porozumienie się światowej społeczności. By w relacjach między poszczególnymi ludźmi, jak i całymi narodami mógł się rozwijać duch przyjaźni i pokoju. Dziś wiemy, że był to pomysł znakomity i niezwykle użyteczny. Esperanto sprawdza się w międzyludzkim dialogu – jest neutralne, nie stanowi dziedzictwa czy własności żadnej grupy, nie ma też ambicji wypierania języków narodowych. Innymi słowy – każdemu daje równe szanse.

Rad jestem, że rosną nieustannie szeregi użytkowników esperanto i poszerza się w świecie krąg jego oddziaływania. Ludzie, którzy nim władają spotykają się bowiem nie tylko dlatego, że łączą ich wspólna pasja, lecz także po to, aby lepiej się poznać, wzajemnie odkrywać różne obyczaje, tradycje, także marzenia. By wspólnie mówić o przyszłości.

Cieszy mnie także i to, że tym razem młodzi esperantycy na miejsce swego ogólnoswiatowego spotkania wybrali Polskę – ojczyznę twórcy tego języka. Kraj, któremu nierwytę bliższe są Wasze ideały. Wyrzynam nadzieję, że spodoba Wam się nasza ziemia, tradycje i współczesność. Ze wywizcicie stąd miłe wspomnienia.

Zyczę owocnych obrad, pożytecznej wymiany doświadczeń i nawiązania nowych przyjaźni. Wszystkiego dobrego!

*Aleksander Kwasiński*

Aleksander Kwasiński

4

2005

## Enhavtabelo:

- 
- 3 Pola Esperantisto baldaŭ 100-jaraĝa!  
*Zofia Banet-Fornalowa*
- 
- 5 Inter la morto kaj la amo. Pri la poezio de Halina Poświatowska  
*Tomasz Chmielik*
- 
- 18 Ĉiuj miaj mortoj  
*Halina Poświatowska / Lidia Ligęza*
- 
- 20 La prepozicio KONTRAŬ en praktika uzo  
*Czesław Baranowski*
- 
- 20 Komunikoj  
*Zofia Banet-Fornalowa*
- 
- 23 Kęty — sukcesa aranĝo  
*Czesław Gluza*
- 
- 24 Konciza raporto pri la 27a ĈEP  
*Czesław Baranowski*
- 
- 25 Pola NESTO  
*Stanisław Śmigieński*  
*Stanisław Mandrak*
- 
- 27 IJK Zakopane — materialoj
- 
- 31 Funebre — Adam Goralski-Pawlikowska  
*Halina Oleszek*
- 
- 32 Esperanto-Teatro „ESPERO”  
*aktuala repertuaro*

**Kovrilpaĝe:** oficiala letero de prezidento Aleksander Kwaśniewski al la partoprenantoj de la IJK en Zakopane. Sur la paĝo 27 troviĝas la Esperanta traduko de la teksto.

---

## Redaktoraj vortoj

Karaj legantoj! Ĉi tiu numero de la revuo estas laŭplane en viaj manoj fine de aŭgusto. Antaŭ ni „lerneja jaro”, kiu postulas pli da zorgo pri niaj infanoj kaj... pri ni mem. Estas ankaŭ la tempo por komenci kursojn, prelegojn, kaj — ĝenerale — pliaktivigi en Esperantujo.

Pri ĉiuj viaj agoj kaj sukcesoj skribu al la redakcio, retroŝte al la nova, ununura adreso:

**hejme@hejme.com.pl**

Antaŭdankon!

**Kazimierz Leja**

---

## Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.

N-ro 4/2005 – ISSN 0032-2431  
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

**Redaktoro:** Kazimierz LEJA

Ĉiujn korespondantojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro.

**TTT-paĝo:** [www.hejme.com.pl](http://www.hejme.com.pl)

**Retpoŝto:** [hejme@hejme.com.pl](mailto:hejme@hejme.com.pl)

**Tel.:** (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redaktoro rezervas al si rajton mallongigi kaj redakti la tekstojn.*

**Jarabono enlanda:** 30,00 PLN pagenda al:  
Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź,  
str. Wąska 21, skrytka 59  
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

**Jarabono eksterlanda:** 12,00 EUR pagenda al:  
UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:  
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6 EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

## **Pola Esperantisto baldaŭ 100 jaraĝa!**

*Pola Esperantisto* ne apartenas al la plej fruaj E–periodaĵoj. Do ne ĝia pionira rolo instigas min verki pri ĝi. Kiam nia revuo komencis aperi en julio 1906, en pluraj landoj de la mondo aperadis jam kelkdeko da E–revuoj. Eĉ tiaj malgrandaj landoj kiel: Finnlando, Estonio, Malto kaj eĉ foraj kiel Nova Zelando, Filipinaj Insuloj preskaŭ samtempe kun pollandaj esperantistoj (ĉefe en la jaroj 1907–1908) ekhavis siajn E–revuojn, aŭ almenaŭ bultenojn, kaj pli frue propagandis Esperanton per pluraj artikoloj en sia nacilingva gazetaro.

Kaŭzo de postresto de pola E–movado ankaŭ ĉi–rilate estas manko de sendependeco kaj malhelpo de fremdaj regantoj en evoluo de pola kulturo entute, do ankaŭ de pola E–movado. Ĉi lastan ne favoris ankaŭ polaj dekstraj naciismaj politikaj fortoj, kio aldone bremsis ĝian disvastigon.

Instigas min skribi por *Pola Esperantisto* ĉefe fakto, ke temas pri la revuo, kiu ekestis en naskiĝlando de Esperanto. Ke forte ĝin subtenis ties kreinto dro L.L. Zamenhof, kiu dum kelka tempo eĉ estis ĝia ĉefredaktoro. Kontribuis al ĝi du aliaj fratoj de dro Zamenhof — Aleksandro kaj Felikso.

Tre interesa, de diversaj vidpunk-

toj, esta la historio de la revuo mem. Tamen apartan kaŭzon formas Ora Jubileo — baldaŭa centjariĝo de ĝia ekzisto.

*Pola Esperantisto* indas esti vaste konata pro ĝia, dum kelkaj periodoj, altnivela enhavo. Ne mirinde ja verkis por ĝi eminentaj polaj esperantistoj: A. Grabowski, K. Bein, A. Zakrzewski, B. Kuhl, J. Ŝapiro, S. Karolczyk, O. Bujwid, J. Zawada, I. Dratwer, kaj pluraj aliaj. Kunlaboris eminentuloj eksterlandaj, por nur mencii: P. Lengyel kaj T. Cart. Ĝenerale dirite, gravas, ke ĝi dum sia daŭro servis, kaj tio estas ĝis nun la ĉefa celo de la revuo: kontribui al evoluo de pollanda, do samtempe al la internacia Esperanto–movado.

Kiel dirite la 100a naskiĝdatreveno de lanĉo de *Pola Esperantisto* formas apartan okazon por vaste ĝin konigi. Diverstema kaj diversĝenra scio, kiun ĝi ampleksas, kolektita dum 100 jaroj, estas nemalhavebla parto de nia historio. Sciate, ke kono de la historio formas unu el la ĉefaj premisoj de nia identiĝo kun la Movado. Ĝi ankaŭ estas bezona por ke oni ĉerpu de ĝi por nia nuntempa aktivado. Kio ankaŭ gravas, laŭbezone, surbaze de ĝi kapabli kontraŭstari al malfavorantoj de la Internacia Lingvo kiel portanto de profunde humanis-

maj idealoj. Tiuj nemalofte profitas de malklereco pri propraj radikoj de granda parto de esperantistoj, manipulante per hazardaj, ne kontrolitaj „malkovroj” misfamigi la Kreinton de Esperanto kaj per tio malutili al la Movado.

La nuna redaktoro de *Pola Esperantisto*, samtempe posedanto de la eldonejo „Hejme”, ekhavis ideon omaĝi la jubileon de la revuo per diskonigo de scio pri ĝi kaj samtempe omaĝi al ties kontribuintoj. Lia ideo meritas plenan apogon. Tamen ĝia realigo en tiom mallonga periodo (ĝis julio 2006 restis malpli ol unu jaro) donas malgrandajn ŝancojn por eventualaj realigantoj (?), realiganto.

Li do turnis sin al mi... Restas nenio alia krom maksimume fortostreĉi kaj provi prepari iun ĉi-rilatan prilaboron. Mi tute ne certas, ĉu tio montriĝos ebla... Tamen mi promesis provi.

**Ĉi-loke mi deziras direkti alvokon al ĉiuj gekolegoj, kontribui al tiu ĉi grava tasko.**

Unue, ni faru ĉion eblan por plimulti la abonantaron por la Jubilea Jaro de nia revuo.

Due, mi proponas verki artikolojn koncernantajn *Polan Esperantiston*. La temoj kaj la ĝenroj povas esti diversaj, laŭ plaĉo kaj eblecoj.

Mi antaŭmetas nur kelkajn proponojn, sed ja ili povas esti multaj kaj tute aliaj. Jen ekzemplaj temoj:

Kiel *Pola Esperantisto* influis mian kleracon?

Kiel ĝi servis al niaj E-kursoj, al prezento de la lingvo al neesperanti-

stoj, por klubvesperoj, en interŝanĝo de opinioj pri la Movado, aŭ de revuoj?

Kio plej plaĉis de ĝia pasinto kaj nuntempo?

Per kio mi mem kontribuis al ĝi?

Povas esti, ke de alsenditaj kontribuajtoj ekestos interesa kaj grava dokumento, servanta al daŭra evoluo de la revuo.

Tio estus vere digna omaĝo al la centjariĝo de *Pola Esperantisto*. Restas do nenio alia, sed nur: por la bono de la Afero, ek al la laboro!

Sukcesojn!

**Varsovio, la 15an de aŭgusto 2005**

[red] Al la supraj vortoj aldoniĝas mia mallonga komento:

Kiel sciante, PE estas redaktata kaj eldonata kiel „sendependa revuo de polaj esperantistoj”. Tio signifas, ke ĝi estas „nenies organo”, por ke ĉiuj esperantistoj povu trakti ĝin kiel „liberan tribunon” por esprimi siajn pensojn pri nia historio kaj nuntempo kaj ĝui sendependan etoson.

Evidentiĝis tamen, ke la formulo „nenies organo” post du jaroj de aperado de PE tute ne faciligis la aferon. Vidante tion, antaŭ pli ol unu jaro mi direktis alvokon al la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio („plej granda pola esperantista organizo”), pli vaste diskonigi la aboneblecon de PE inter siaj membroj, por pluvigigi la revuon, minacitan de la denova mal-ekzisto.

Nenio konkreta okazis flanke de PEA... escepte de 3 (tri) kromaj abonoj de la varsovia filio de PEA.

En la Jarlibro de UEA ‘2005 ni povas tamen tralegi, ke PEA havas sian organon, nome... (kiu konas la respondon?).

**Kazimierz Leja**

# Migre tra la parko de pola literaturo...



## inter la morto kaj la amo

...kun „dikulo”

### pri la poezio de Halina Poświętowska

Halina Poświętowska (fraŭlina nomo Myga) naskiĝis la 9an de julio 1935 en Ĉenstoŭovo. Kiam ŝi estis dekjara, ĉe la militofino, ŝi malsaniĝis je la angino, post kiu venis artikito, kaj sekve — difekto de la kora valvo. Kun tiu nekuraĉebla malsano ŝi devos vivi. Malgraŭ ĝi, kaj eble spite al ĝi, ŝi edziniĝis en 1954 kaj eklernis en liceo por laborantoj. Post du jaroj ŝia edzo, ankaŭ kormalsana, forpasis. En 1958 aperis ŝia poemaro *hymn bałwochwalczy* (idolhimno). Ĉi tiu poemaro entenis 68 poemojn. Kritikistoj akceptis ĝin favore. Stanisław Grochowiak, poeto, skribis en sia recenzo *Ciało* (Korpo) (en: *Współczesność* (Nuntempo), n-ro 5/1959), ke ŝia poezio estas *fenomeno de pola virina poezio, fenomeno de aŭtentika erotismo*. Li rigardis la poezion de Poświętowska tra la prismo de ŝiaj malsano, suferado. Kaj Jerzy Kwiatkowski diris:

*La poezio de Halina Poświętowska estas tera, kaj ne ĉiela, ĝi estas regata, kaj ne suverena. Ĝi vivas per teraj aferoj, mi pensas, ke ili estas nemalhaveblaj. Estas poetoj, de kiuj oni povas forpreni ĉion. Provu forpreni de Poświętowska amon.* (en: *Twórczość* (Verkado), n-ro 7/1959).

Aŭguste de 1958 Halina vojaĝis per ŝipo al Usono. En Novjorko, profesoro Nicols el Filadelfio, unu el la plej famaj kirurgoj de la mondo, faris operacion, kiu daŭros sep kaj duonan horojn. Post la operacio Halina ne pensas reveni al Pollando. Ŝi volas ĝui la vivon, vidi, senti, ekkoni. Aprile de 1959 ŝi ricevis stipendion kaj aŭtune ekstudis en Smith College. La studojn ŝi finis kun tre bonaj notoj. En 1961 ŝi rehejmiĝis. En Krakovo ŝi daŭrigis studojn kaj en 1963 magistriĝis en Jagellona Universitato pri filozofio kaj komencis preparojn por doktoriĝo.

En 1962 aperis la poemaro *Dzień dzisiejszy* (La tago hodiaŭa). Denove kritikistoj montris sian favoron. Liriko direktita al la aferoj de amo (...) La poe-

moj de Poświętowska kuniĝas kaj kompletigas unu la alian, formas diversajn punktojn de aliro al la komuna travivado de la mondo... (...) Tiu ĉi travivado estas samtempe defendo kontraŭ duobla soleco, kiu povas fariĝi amo. (Michał Sprusiński, *Życie miłością* (La vivo per amo) (en: *Twórczość* (6/1964). Tiu ĉi volumo estas kvazaŭ postrikolto de la trijara restado en Usono.

Komenciĝis la plej malfacila periodo en la vivo de Halina. Oftaj restadoj en malsanulejoj, la koro ne plu batas ritme, ŝi treege laciĝas, suferegas, sed ne cedas. Ŝi kroĉiĝas al la vivo, avide ĵetas sin en ĉiutagaĵojn, malgraŭ ke ili povas mortigi ŝin.

En 1966 ŝi forveturis al Dubrovniko, kaj poste al Parizo. Estis ŝiaj du lastaj vojaĝoj. Aperis la tria poemaro *oda do rąk* (odo al la manoj) kaj prozaĵo *Opowieść dla przyjaciela* (Rakonto por la amiko). Per tiu rakonto ŝi celis prezenti sian *psikan biografion*. Ŝi ŝpinas ĝin kiel araneaĵon inter amo, obstino kaj perfido. Amo favoras ekziston, obstino plifortigas kaj plifirmigas ĉi amon, kaj perfido estas kontraŭ la vivo — ŝi tamen ne faris ĝin, ĉar ĉiujn ŝiajn farojn kaj klopodojn gvidis la obstina amo. Amo al la alia homo kutime ne enhavas obstinon, amo al la vivo, al la ekzisto je ĉia prezo — konsistas nur el obstino. Ĝuste pro ĉi tiu amo ŝi studis kaj lernis kun nekredebla fervoro, ŝi migris kun pasio tra Pollando, du fojojn ŝi traveturis la oceanon, tial ŝi vojaĝis al Jugoslavio kaj Francio kaj skribis *Opowieść dla przyjaciela*.

*Mi parolos, Amiko. Plej volonte mi silentus, sed la silento ne estas solvo, la silento klarigas nenion. Kaj mi klopodas ĉiam denove klarigi al mi kaj al vi, ke tio, kion mi faris, ne estis perfido. Eĉ tiam, kiam mi deziris morti, mi ne perfidis kaj ne trompis vian kredon je mi.*

*Kaj tial, Amiko, kontraŭ via silento, mi defendos min per vortoj.*

*Mi volas rememorigi min al vi tia, kia mi estis dum ĉiuj jaroj, kiuj pasis por ni kune — kiam niaj pensoj fluadis paralele, konsciaj pri sia proksimeco; sufiĉis skribi leteron, etendi manon, por renkonti viajn vortojn, vian amikan geston.*

Tiel komenciĝas *Opowieść dla przyjaciela*. Kiun ĝi celas: ĉu la amatan forpasantan edzon, ĉu nin, kiuj legos ĝin? Kio ĝi estas? Provo de aŭtobiografio? Letero? Pekokonfeso? Adiaŭo?

Pli kaj pli ŝi alproksimiĝis al la morto. Do, *Opowieść dla przyjaciela* certe estas lasta krio, la provo alparoli nin, ke ni almenaŭ iomete memoru pri ŝi, ke ne tuta ŝi forpasis.

Somere de 1967 Halina venis al la hospitalo, por la lasta fojo. La 11-an de oktobro ŝi forpasis post la malsukcesa operacio. Ŝi pretigis sin al tiu forpaso, poezie celebris sian morton. En la hospitalo ŝi skribis poemon, kiu mildigis longajn semajnojn, pasigitajn tie:

*estas la malbona loko  
kaj mi tre miras al la amo  
ke ĝis nun ĝi ne rektigis siajn fleksiĝintajn krurojn  
ne desaltis malpeze  
kaj ne foriris  
sur tiu alta lito  
multe pli bone  
iom post iom  
enprofundiĝante en stakon da kusenoj  
per la blanka koloro  
al la blanka litotuko alkroĉita  
prezentiĝas la morto*

Halina mortis sola. Sur la kvietaj, bela vizaĝo ne estis timo, sed glitis rideto. Oni entombigis ŝin apud la edzo en Ĉenstoŝovo. Tadeusz Nowak, verkisto, amiko de la poetino, skribis: *Ne eblas pensi pri la adiaŭo al Halina. Ŝi ja estis unusola poetino, kiu en siaj poemoj bonvenigis ĉion. Kaj la bonvenigon ŝi komencis per tio, kio plej gravas en la homa vivo — per la amo. Kaj Stanisław Grochowiak, poeto, adiaŭante ŝin per artikolo Krzywda (Maljustaĵo) diris:*

*Ŝi kredis, ke se nenio alia savos ŝin, do almenaŭ honesteco de la sorto. Ĉu povas malaperi tia kontribuo de laboro kaj bona volo? Kiu kuraĝos disŝiri tiujn fadenojn, kiujn ŝi etendis, inter si kaj la vivo? (...) Kaj laŭŝajne tio estas ŝia malĝaja sukceso: ne povante resti inter la vivantoj, almenaŭ sian forpason ŝi igis nekredbla.*

*foje  
treege sopirema  
mi aperas al homoj  
kun estinta vizaĝo  
iras per miaj eksaj piedoj  
kaj tuŝas ilin per rido  
per estintaj manoj*

*sed malkaŝas min la haŭtdiafano  
similanta al strukturo de papero  
kaj malmovo de ombro  
post traŭro mia  
mankas la plej eta spuro sur la neĝo*

*kaj subite frapitaj ili scias*

*disŝovas sin ektimigitaj  
oferante al mi grandan blankan spacon*

Ne kredante al la homa memoro, Halina Poŝwiatowska konfidis la memoron pri si al siaj poemoj.

*Ĉu ĉio restos sama, kiam mi ne plu estos? Ĉu libroj de kutimiĝos de laodoro de miaj manoj, ĉu roboj forgesos la odoron de mia korpo? Kaj homoj? Dum momento ili parolos pri mi, miros pri mia forpaso, forgesos. Mi ne havas iluziojn, Amiko, la homoj entombigos nin per sia memoro tiel rapide, kiel ili enterigos niajn korpojn. Nia doloro, nia amo, ĉiuj deziroj malaperos kun ni kaj eĉ ne restos malplena loko. Surtere ne estas la malplena loko. (Opowieść dla przyjaciela).*

La poezio estis por ŝi granda ŝanco venki la izolon dum la malsano, triumfi super la timo pro la senĉese minacanta morto. Ĝi permesis al Halina ludi en la vivo la rolon de verkistino. Se tiel ni komprenos ŝian poezion, ĝi estos konfirmo de ŝia individua ekzisto. La plej maldaŭraj kaj subjektivaj sentoj: timo, doloro, ĝojo, amo ricevis universalajn dimensiojn.

Kiel dirite, Halina vivis la vivon senĉese, daŭre minacatan de la morto. La pasinta tempo estis por ŝi nur *tago hodiaŭa*, sen ajna estonteco. Kaj tiam la poezio fariĝis provo trompi la pasadon. Ĝi konservis la memoron pri la homo, pri ĉio, kio estas plej malfirma.

La morto devigis ŝin al la demandoj: pri la senco de sia propra vivo kaj pri la ĝenerala senco de la vivo. Morto kaj vivo estas unueco, kaj ĉi dialektikon esprimas la poezio de Halina.

La ĉefa principo de ĉi tiu poezio estas principo de *opozicio*. Tio, kio estas kontraŭa, kompletigas sin kaj formas tuton. Same okazas pri la vivo kaj pri la morto — ili formas la tuton nedisigeblan.

Akceptante ĉi principon, Poŝwiatowska bezonas fojfoje pravigi la neceson de sia vivo en la mondo, malsovaĝigi por si la morton:

*kaj tamen  
estas agrable ekpensi*

*ke la mondo iom mortos  
kiam mi forpasos”  
(ĉu la mondo iom mortos)*

Serĉante la vivon kaj amon, la poetino ne preterlasas ajnan signon de la morto, de forpasado en si kaj ĉirkaŭ si — estas malapero, velko.

En sia *Traktaĵo pri la historio de religio* Mircea Eliade skribas: *Kiu vivas regata*



*de la tempo, estas fordonita al ĉiaspecaj suferoj, kaj liberigo konsistas antaŭ ĉio en malaperigo de la tempo, en forkuro de la universala ŝanĝo.*

Ĉe Poŝwiatowska estas forkuro en la mondon de poezia simbolo. Kelkfoje tamen la poetino rezignas aktivan sintenon kaj fariĝas pasiva. Ŝi eniras en sin por aŭskulti, ŝi kunfandiĝas kun la mondo en la momentoj, kiam ĉio rigidigas kaj kvietiĝas.

*kiam mi estas  
en la molaj kokonoj de la tagoj  
kiam mi kuntiriĝas en tiuj molaj kokonoj  
mi ne scias  
(la tempo estas relativa)  
ĉu la tagoj pasas  
ĉu pasos mi  
(kiam mi estas)*

Sed Poŝwiatowska tiel rekte minacata de la forpaso, tiel ĉiutage sieĝata de la morto, ne povas imagi sian propran malaperon. La homo, kiu sin kaŝas malantaŭ la vualo de la iluzia eterneco (*la aliaj forpasas — mi restos*) ne povas trapenetri komprene la propran morton. Nur en la situacio, kiun formas nekuracebla malsano, oni ekhavas konscion, ke tio, kio daŭre akompanas la vivon minace kaj interrompe, alprenas kaj prezentas iun finfinan dimension.

Halina Poŝwiatowska estis tre forte ligita al sia *fizika* ekzisto kaj ne serĉegis la savon en mistiko. Same kiel en greka tragedio ŝian sorton decidis la ritmo de ŝiaj vivo kaj poezio.

La saman senton pri ĉeesto de la morto, kiun ni trovas en la mondo de Poŝwiatowska, ni trovas en la poemo de Urszula Kozioł *Wahadło cienia* (Pendo de l' ombro):

*Ĝi estas inter ni, kiam ĝi ankoraŭ ne estas.  
— Ĉu blinda besto rigardis en viajn okulojn?  
Ĉiam ĝi estas tro proksime. Ĝi estas malgraŭ. Antaŭ ol  
ĝi estas. Ni bredas ĝin en ni. Ĉiu posedas ĝin.  
Sed neniu ĝin konas. Oni apenaŭ sentas  
ĉeeston de la forestanta. Ne eblas  
rigardi en ĝiajn okulojn. Ĝi ne havas la okulojn.  
La manpulsos ĝi regas.  
Tamen kio estas ĝia ĉeesto, kiam ĝi aperas,  
Scias nur la mortintoj. Ili estas kvazaŭ ĝi.*

Ĉi tiun senton de ĉeesto forestanta Poŝwiatowska provas materialigi. Ŝi fa-

ras klopodojn por antaŭvidi la simptomojn de sia propra morto, rememorante kaj repriskribante alies forpasadon. Ŝi deziras trovi respondon al la demandoj: *Ĉu ĉiuj tagoj estas perditaj por mortintoj kaj Ĉu la morton akompanas fizika doloro*. La okazon por tio donas vizitoj al la tombejoj de homoj kaj objektoj (muzeoj):

*strieto de mateno  
pli kaj pli ofte blankiĝas en miaj dudek ok jaroj  
la lastajn kvar mi pasigis per filozofio  
mi intencis ekkoni misteron de l' estado  
sed tio, kion oni prezentis al mi  
estis nek arbo, nek korpo  
kaj nur vortoj vortoj vortoj*

*la homoj estas mortemaj  
Sokrato estas homo  
do Sokrato devas forpasi  
mortopuno plenumita  
Sokrato forpasis  
en la flava poto velkas  
floroj aĉetitaj sur la bazaro*

*tiun lokon mi vizitas ĉiutage  
mi ne atendas la amnestion  
(vizito)*

En la poezio de Poŝwiatowska la plej gravan rolon ludas biologia aspekto de la morto. Ĉiumomente forpasonta, ŝi scias, ke la KORO estas ne nur simbolo de amo, sed portanto de ŝia malsano. Inter ĝi kaj la poetino estas precipa rilato:

*mia koro estas absoluta reganto  
(...)  
ĝi malvalidigas por mi la mondon  
(mia koro estas absoluta reganto)*

*birdo de mia kor'  
kun mallevitaj flugiloj  
ne baraktu  
mi nutros vin per mortograjno  
vi endormiĝos  
(birdo de mia kor')*

Ĉe Poŝwiatowska la morto troviĝas en la koro. La poetino apartigas ĝin de sia organismo, animigas kaj samtempe kontraŭstarigas al si mem. Rimarkinda estas la momento de tiu apartigo:

*atente mi portas la koron  
kiel la dehakitan kapon de sankta johano  
la tero dancas sub miaj piedoj”  
(atente mi portas la koron)*

Tiel apartigite kaj animigite la koro estos enkarniĝinta motivo de birdo:

*sub mia maldekstra brako  
en la varma nesto  
vivas la koro–birdo  
batas la koro–birdo  
per la senhelpaj flugiloj”  
(sub mia maldekstra brako)*

La koro fariĝis birdo, kiu nestas en la homa korpo. Ĉe birdo oni povas nur trankviligi la flugilojn, kiujn flirtigas, baraktigas timo. Tiu ĉi metaforo prezentas ankoraŭ unu sencon: la *birdo–koro* volas elsalti el sia kaĝo, sed libereco signifus morton por la homo kaj por la koro mem.

La morto — tiu disfalo de la homa karno je atomoj — plene senesperigas la poetinon kaj pensigas ŝin pri *cindro*:

*mi ŝutiĝas  
cindre  
malsupren  
(veritas)*

pri kuniĝo de la korpo kun la tero:

*mi ne scias, kien post la morto migros  
la plej malgrandaj atomoj  
mi ne kapablas promesi al ili la paradizon  
interstelaj vojaĝoj ne estas por ili  
obeante graviton ili falas falas  
(kelkfoje venas la severa konscio)*

Spite al sia materialista sinteno, Halina Poŝwiatowska provas imagi, kion komencas la fino de la biologia vivo. Por tion ekscii, ŝi faras dividon je la vivo

kaj je la *transa flanko*, al kiu vojon baras ĝuste la morto. Tio, kio formas ligilon inter ili, estas nokto. En la greka mitologio — nokto estis kunigita kun morto. Por la poetino la nokto favoras amon kaj ĉi-aspekte oni ligas ĝin kun la vivo:

*ni parolu nenion al la nokto ĝi estas surda*  
(kisoj)

*estas niaj noktoj*  
*disŝutitaj*  
*je steloj je sunoj*  
*brilantaj obstine*  
*per lumo kaj per tremo*  
*altirantaj mallumon*  
(bilanco)

*nokte en miajn etenditajn brakojn*  
*kun varma nokto*  
*kun malseka roso*  
*venu*  
(mi sopiras pli forte)

*nur en mallumo*  
*mi ektuŝetos hararon de l' morto*  
(ridetante mi diras)

La *transa flanko* estas kontesto de la vivo, kiu por Poŝwiatowska signifas ĉiaman, daŭran, senĉesan naskiĝon (laŭ Fromm: *Vivi signifas naskiĝi ĉiumomente. Kiam finiĝas la naskiĝo, venas la morto.* (en: *Skizoj pri la psikologio de religio*). Tia vivo bezonas varmon kaj lumon de la suno, kolorojn kaj odorojn, movon (ofte en la poezio de Poŝwiatowska aperas la motivo de *freneza danco*).

La morto senkolorigas ĉion, senodorigas kaj senmovigas. La forpasado okazas *meze de la vojo* al la *transa flanko*, al la flanko de la ombro. Ĝi estas neevitebla (Poŝwiatowska esprimas tion per la nura konjugacio: *Mi forpasos, vi forpasos, li forpasos...*). *Meze de la vojo* al la *transa flanko* kunpuŝiĝas du spacoj: de l' tempo kaj de l' eterno. En unu daŭras la ŝanĝiĝanta vivo, kaj en la alia — ĉio rigidiĝas kaj forlasas la tempon. En la poezio de Poŝwiatowska aperas fendo: la vivo ankoraŭ daŭranta kvazaŭ haltas en la spaco de l' tempo, kie okazas ĉiutagaĵoj:

*mi devas bruligi fajron aĉeti panon  
tralegi Platonon  
mi devas ekpensi pri morgaŭ  
(mi ankoraŭ volvas miajn harojn sur papilotojn)*

Forpasado de la mondo, malĝojo pri maldaŭro, epizodeco kaj hazardeco de la homa vivo, velkado, sopiro al la amo, drama konscio pri la baldaŭa morto, la deziro vivi spite al la verdikto de biologio — konsistigas historion de la poezio de Poświętowska.

Nur la amo donas savon, forgeson pri la minaco, trankviligon al la koro.  
Halina ekkonis sian edzon en la sanatorio:

*Irante en suna posttagmezo, sub malalte pendantaj branĉoj, mi nur komprenis, ke mia konato estas malgaja kaj li ne kapablas raviĝi pri la herbejo, kiu plej forte odoras je krepusko, ke ĝojigas lin nek frenezaj turniĝoj en danco, nek kisoj. Mi decidis instrui al li ĝojon. (Opowieść dla przyjaciela)*

Tiu instruado preskaŭ kostis al Halina la vivon.

*Vespere mi dancis multe kaj rapide. Subite mi eksentis premegon en mia laringo — tiu konata sufoko kaptis min je la gorĝo. Mi elkuris el la homplena salono kaj sidiĝis sur la gazono. Mi respiris profunde, sed la premeĝo ne cedis. Mi ekiris al la sanatorio. Komence malrapide, kaj kiam mi sentis, ke la sufoko plifortiĝas — pli rapide. Mi spiregis pene, kaptante aeron per mia buŝo, malfermita larĝe, el mia gorĝo elsaltis ruĝkaj fajfoj (...). Inter fajfoj mi kriis: — Panjo! — kaj — Mi ne volas morti! (samloke)*

Nur tuja helpo de kuracisto savis al ŝi la vivon. Transportite al la hospitalo ŝi ekvidis mortadon de aliaj homoj:

*Preskaŭ ĉiutage forpasis iu. Ĉiam estis la sama ritaro. Blankaj figuroj de kuracistoj, klinitaj super la lito, flugilforma kufo de monaĥino kaj tuj poste enkureganta pastro. La lasta unko, kelkaj tremoj de jam rigida korpo. Blanka litotuko migras al la rando de la lito, kovrante la vizaĝon senfende, dum momento silento, kaj poste krako de la lito, forpuŝata en la koridoron. (samloke)*

Ĉifoje ŝi ne mortis. Ŝi rehejmiĝis, kaj la knabo vizitis ŝin. Ŝi ekamis lin. Estis la unua knabina amo. Ŝi havis dekok jarojn:

*Mi alkroĉiĝis al li forte, enpremante la vizaĝon en lian kolon, enŝovante la manojn en la varmajn nestojn de lia ĉemizo”. (samloke)*

Post du semajnoj ili geedziĝis. Finfine ŝi trankviliĝis:

*Mia korpo, kiu ĝis nun estis interesa objekto nur por kuracistoj, subite fariĝis grava kaj utila (...). Tuj poste mi al kutimiĝis ekdormi kun la korpo, enŝovita en liajn brakojn, kun la dorso, forte alpremita al lia brusto. Turniĝante nokte sur la flankon, mi sentis, ke liaj brakoj ĉirkaŭprenas min tradorme. (samloke)*

Sed tiuj feliĉaj noktoj ne daŭros longe. Adolf Poŝwiatowski ekhavis kordolorojn. Halina metis al li malvarmajn kompresojn. Sed tio ne helpis. Pli kaj pli oftaj estis atakoj de sufoko.

*Meze de nokto, vekita pro hasta spirado, mi alpremis la manojn al liaj paliĝintaj vangoj. — Ne timu — mi parolis — mi ne lasos vin morti sola, ni forpasos kune. (samloke)*

Finfine, laŭ persvadoj de Halina, Adolf vizitis kuraciston. La kuracisto, kun paralizitaj kruroj, demandis:

— *Kial vi geedziĝis?*

— *Ĉar ni amas unu la alian — respondis mia edzo.*

— *Mi vidas — en la voĉo de la kuracisto aŭdiĝis kolero. — Sed tiuj du koroj signifas morton, malkune vi havas ŝancon, kune — nenion. (samloke)*

Al Adolf la kuracisto ordonis ŝesigi studadon, li tamen ne obeis. Li volis lerni spite al ĉio. Oni trovis lin mortinta en hotelĉambro.

*Tiu morto, Amiko, dolorigis min pli ol ĉiuj forpasoj, kiujn mi vidis ĝis nun. Tiu morto tuŝis min pli forte. La korpon, tiel konatan al mi, kiu ŝajnis esti parto de mia korpo, superŝutos nun la tero. Liajn profunde enkaviĝintajn okulojn, lian kredon pri la vivo, lian amon. Li foriris de mi, lasante min pli sola ol tiam, kiam li ankoraŭ ne aperis. (samloke)*

La forpaso de la amata viro kondamnis Halinan al soleco. En Adolf ŝi serĉis rifuĝon. Ŝi estis kreita por amo, kaj la amo mem estis por ŝi insulo de la savo en la senco metafizika, ĝi mildigis timon antaŭ la morto, sed ne plene forigis ĝin. Ĝi povis ja mortigi ambaŭ geamantojn dum ĉiu sekskuniĝo. La poetino ne mensogas, kiam ŝi parolas:

*mi ne povas kunmeti el vortoj  
amon  
ĝi kreskas en mi*

*pulas en radikoj  
ekŝvelas en trunko  
releviĝas  
la herbo distretita ĉiutage  
(kiel disigi min de via obstina buŝo)*

Tiuj vortoj ŝajne banalaj, ekhavas ĝustan sencon, kiam en la sama poemo ŝi konfesas: *ĉiuvespere mi enlitiĝas sola.*

Precipe kortuŝas la poemo *mi atendis longe:*

*la buŝon mi trompis per la kareso  
de bunta ŝminko  
(...)  
kaj la mamojn mi tuŝis per la mano  
mi flustris al miaj suprenlevitaj cicoj  
atendu — venos tiu  
kies fingroj  
donos al vi kvietan havenon  
(...)*

Poŝwiatowska atendas senĉese la amaton: *Se li ne venos / la mondo estos pli malriĉa / je iom da amo / je kisoj / kiuj ne enflugos / tra la malfermita fenestro.* Ŝia poezio fariĝos senfina vokado, logado (*prenu min — mi estas kiel nubeto*).

El sia memoro Poŝwiatowska eligas amoscenojn, ĉiujn momentojn de feliĉo, sed ŝia imago kreas ĉiam pli novajn sencojn, kiujn verŝajnigas la pasinteco. Ŝi vokas al sia amato—edzo, kiu venas de la *transa flanko*, dorme kaj maldorme. Malperas la limo inter la nokto kaj la tago, inter la songaj fantaziaĵoj kaj la tuŝebla realo:

*do vi estas estas estas  
mi kontrolu  
mi tuŝu vin ancorauŝfoje per la mano  
mi rigardu en viajn okulojn, kvankam mi kredas malpleje  
al la okuloj blindaj pro mirego  
vian voĉon mi deziras aŭdi  
enspiri vian odoron  
tuŝi vin lastfoje per ĉiuj sensoj  
kaj neniam kompreni kaj senĉese  
retrovi la veron per kisoj  
(do vi estas estas estas)*

Dum unu el siaj restadoj en la sanatorio Halina ekkonis viron, kiu same kiel

ŝi kuracis la koron. Li estis germano, li alvenis de nenie kaj plenigis ĉiujn miajn pensojn — ŝi diros poste.

*Kelkfoje mi vidis, kiel doloro streĉas al li la vizaĝon, kiel paliĝas liaj lipoj kaj falas la palpebroj.*

— Estas nenio — li parolis — post momento tio pasos, ne foriru de mi, mi volas senti vin apude, mi volas scii, ke vi estas...

— Ni mortu kune — mi petis — mi ne timas, mi tute ne timas.

*Kaj tiam liaj okuloj malheliĝis, li klinis la kapon kaj parolis: — Mia vivo ne apartenas al mi, vi scias, ke mi ne povas forkuri tiel..*

*Tio estis plej doloriga el ĉiuj veroj. Tiun tagon, kiam li unufoje sidiĝis sur la apogilo de la parkobenko, li diris rapide, kvazaŭ ĉeokaze, ke li havas familion — edzinon kaj infanon — li etendis antaŭ miajn okulojn nur por mallonge, en daŭro de rigardo, iliajn fotojn. Neniam plu ni reparolis pri lia edzeco, sed neniu povis forgesi tion dum momento. Li ne apartenis al mi. Eĉ tiam, kiam ni iris kune sur pado ĉe la rivero, sub la oblikvaj sunradioj, mi sciis, ke atendas lin alia virino, ke fide kaj ame ŝi pensas pri li resaniĝanta. Li mensogis, trompis ŝin, skribante leterojn, plenajn je varmo kaj kvieto — nur al mi apartenis la vero.*

(...)

*Li forveturos de mi, li forveturos morgaŭ. Starante sur la sojlo de lia ĉambro mi observis, kiel li ĵetas siajn vestaĵojn en la negrandan ledan valizon. Malzorgeme li kunvolvis ĉemizojn, dismetitajn sur la seĝo, li kolektis librojn. Kiam ĉion li enpakis, li fermis la valizon kaj sidiĝis rande de la lito.*

— Venu al mi — li diris.

*Mi alproksimiĝis obeeme, kiel aŭtomato, mi sciis, ke morgaŭ, kiam tagiĝos, li forveturos, kaj tiu momento ŝajnis al mi minace baldaŭa.*

— Mi tute ne volas, ke vi foriru, kaj mi scias, ke vi devas foriri — mi flustris.

— Mi pensos pri vi ĉiumomente.

*Mia rigardo super lia kapo glitis sur la malhelaj branĉoj de la pino, kreskanta antaŭ la fenestro (...).*

— Mi tre amas vin — mi diris.

*Kaj tiam li alpremimis min al si kaj mi sentis, kiel sopirinda por mi estas lia korpo.*

— Ne, ne — mi diris rapide kaj turnis la vizaĝon al la muro. Mi sciis, ke li tremegas, kuŝante apud mi, kaj same kiel tiam, kiam li haltis subite sur la malplena vojeto en la arabaro, mi atendis kun granda fido, ke li ne prenos min, ke li lasos min tiel kuŝi kun la kapo enpremita en la kusenon, kun la manoj pugniĝintaj ĝis doloro. Kaj samtempe per ĉiu fibro de mia koro mi sopiregis lin kaj super miaj volupto kaj espero ekpendis tiu penso malsemena kiel io neevitebla, la penso, ke li foriros.

— Ne timu — li diris — ne timu, mi amas vin tro forte, por ke mi faru ion spi-



te al via volo.

— Mi tre sopiros al vi.

*Li karesis miajn harojn kaj mi divenis, ke li ridetas, lia voĉo estis tre milda.*

— Mi scias. Kaj ne tial mi kondamnas vin al doloro, ke mi ne scias.

*Milde li demandis, kial mi ne volas, ke li divorcu, kaj mi ne kapablis respondi alie ol per larmoj.*

— Bone — li diris — mi jam ne parolos pri tio, ankaŭ tion mi ne povas fari spite al via volo.

*Mi ploris. La larmoj liberigis min el tiu malpovo, kiu ekregis min de tiam, kiam li diris al mi, ke li forveturos, ke li devas forveturi. Kion mi faros — mi ekpensis — kiam li ne plu estos — kaj mi ne trovis la respondon. (...)*

*Li denove tuŝetis miajn okulojn per la buŝo kaj mi alpremiĝis al li ploreigante, mi alkröĉiĝis al li tiel, kvazaŭ la mondo estus tuj pereonta. (Opowieść dla przyjaciela)*

Halina Poŝwiatowska provis savi ĉion el tiuj malmultaj tagoj kaj noktoj, kiujn la sorto destinis por ŝi. Ĉu la vortoj kapablas defendi min pli bone ol silento, ĉu per la vortoj oni povas ankoraŭ diri ion ajn? Mi serĉegis ilin kun peno, ĉiun mi pririgardis multfoje, mi almezuris al ili mian amon, doloron. Sopiron mi almezuris al la vorto „sopiro” kaj por mia plej granda amo — por la vivo mi trovis la

*plej belajn difinojn. Mi amas la vivon... (...) la morto ĉiam estis proksime al mi, tro proksime, ke mi ne al kutimiĝu al ĝia malvarma, trankviliga tuŝo, ke mi ne devu al kutimiĝi al ĝi... (Opowieść dla przyjaciela).*



*Unu el la plej lastaj fotoj de Halina*

La poezio de Halina Poŝwiatowska estas poezio de granda kuraĝo. Ŝi kuraĝis savi en si la fragilan mondon, kiun ŝi sentis des pli intense, ju pli senkomplete progresis la malsano. Ŝi kuraĝis rigardi en la okulojn de la morto, tiom ofte senigita je

ĉiaj iluzioj, je iu ajn espero. Kaj kio okazos pri mia deziro reveni al la granda urbo kaj ekkoni ĉiun ŝtonon, ĉiun homon? Milionojn da ŝtonoj kaj milionojn da homoj. Ekkoni ilian lingvon, interparoli kun ili, kaj kompreni tion, kion ili respondas?

**Tomasz Chmielik**

# Halina Poŝwiatowska

## Ĉiuj miaj mortoj

(parto unua)

Kiomfoje oni povas morti pro la amo  
unuan fojon amare gustis la tero  
amara gusto  
agaca floro  
dianto ruĝa brulanta  
duan fojon nur gustis la spaco  
blanka gusto  
malvarma vento  
revoko de l' radoj obtuze bruanta

trian fojon kvaran fojon kvinan fojon  
mi mortadis rutine kaj malpli sublime  
kvar vandoj de la ĉambro surdorse  
kaj super mi via profilo akra

\* \* \*

tie kuŝas izolda helhara  
blanka ino kun frizaĵ' oruma  
hela estas nokto hospitala  
okulfajretoj lumas

kiel birdo kaptita murojn  
frapas lace flirtanta spir'  
tra koridor' por renkonti ĝin  
la vaganta vento alkuras

kaj mi scias ke kontesto vana  
ke okazos antaŭ ol aŭror'  
sur la lito spuro de la or'  
kaj ekstere venta flustro — ho tristano

\* \* \*

mia amanto tute ne estas bela  
kaj havas karakteron prefere malfacilan  
sed kiu por mi pentrus la ĉielon  
malhelviole kiel posttagmezo

kiam mi permesus al li foriri  
kaj ne reveni

mia amanto havas varman buŝon  
kaj vicon da akraj dentoj  
kiam ridante  
li respondas je provoko de l' mondo

mia amanto havas buŝon kiu leviĝas  
kiel duonluno super ĉiu mia nokto

mia amanto ne estas sentema  
liaj okuloj  
en ortangulo de la strato dancas  
li ekbruligas en knabinoj flamon

mi alkroĉita ĉe lia ombro  
tenas la amon je haroj  
en lia ombro gracila trunketo de l' herbo  
en aprilan pomarbron disfloras

\* \* \*

folio  
kovru min per verdo  
mi estas aŭtuna nuda arbo  
pro malvarmo tremas

akvo  
trinkigu min  
mi estas sablo  
de la varma seka dezerto  
vento min  
transtuŝas per amo

varmigu min  
vi kiu estas la suno  
antaŭ kiu mi staras  
kaŝita en vortoj  
kiel en la arba ombro  
fonto ŝprucanta

**tradukis: Lidia Ligęza**

## **LA PREPOZICIO „KONTRAŬ” EN PRAKTIKA UZADO**

La origina senco de tiu ĉi prepozicio estas pozicia (ĝi montras pozicion de io), sed oni povas uzi ĝin ankaŭ en almovala senco post verboj. **Ekz.:** Li venis (iris, flugis) **kontraŭ** mi (renkonte al mi). Ŝi ĵetis sin **kontraŭ** li (en la pozicion kontraŭan al li). Por montri, ke kontraŭmovo atingas sian celon uzata estas ankaŭ la **akuzativo post kontraŭ**: Ŝi levis sian vizaĝon **kontraŭ** la plafonon (en la pozicion kontraŭan al la plafono). La akuzativo post kontraŭ esprimas aliffoje kuntuŝiĝon: frapi sin **kontraŭ** la muron.

**Rimarko:** Ĉe reciprokeco oni ofte uzas **kun** anstataŭ **kontraŭ** (lukti, batali **kun** iu), sed oni devas uzi **kontraŭ**, se la reciprokeco mankas. **Ekz.:** senespere lukti **kontraŭ** la morto. Multaj homoj en la mondo baraktas **kontraŭ** malfavoraj vivkondiĉoj.

**Generale parolante, la prepozicio kontraŭ estas uzata ofte en la sencoj:** vidalvide al, renkonte al, fronte al, spite al, kontraŭvizaĝe al, kontraŭflanke al, ktp.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto tiu ĉi prepozicio montras:

**1. Lokon, kiu estas antaŭ iu persono aŭ objekto, sed apartigita per libera interspaco. Ekz.:** Nia

urbodomo troviĝas **kontraŭ** la katedralo (fronte al la katedralo; vidalvide al la katedralo). Mi renkontis ŝin en la kafejeto troviĝanta **kontraŭ** mia domo (vidalvide al mia domo). Ŝi parolis kun mi buŝo **kontraŭ** buŝo. Dum lingvoperfektigado ĉiuj esperantistoj si dis unu **kontraŭ** la alia.

**2. Objekton, kiu malhelpas pluiĝon de movo. Ekz.:** La muro, **kontraŭ** kiun ni iris, haltigis nin pro sia alto. Saltante en la akvon li frapis sin **kontraŭ** la ŝtonan fundon. Por la nokto mi parkis la aŭton **kontraŭ** la pordego.

**3. Objekton, kies naturan pozicion, direkton aŭ tendencon oni inversigas. Ekz.:** Ni naĝis **kontraŭ** la fluo de la rivero. Ŝi longe tenis la vizaĝon **kontraŭ** la suno. Neglektante tradicion li ofte agas **kontraŭ** la kutimo. Neniam karesu vian katon **kontraŭ** la haroj. Mi neniam ion faras **kontraŭ** mia volo. Multaj estas **kontraŭ** mia opinio pri la brila estonteco de Esperanto en Eŭropa Unio.

**4. Objekton, por kiu oni interŝanĝas ion. Ekz.:** Mi aĉetis tiun ĉi libron **kontraŭ** kelke da eŭroj. Li interŝanĝis ĉevalon **kontraŭ** bovino. Ŝi ne sukcesis ĝis nun interŝanĝi sian biciklon **kontraŭ** aŭto. Ili donis al ni peltojn **kontraŭ** armiloj.

**5. Personon aŭ objekton, kun**

**kiu oni komparas alian. Ekz.:** La supereco de homo kontraŭ bruto estas nekontestbla. Kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estus malforta (kompare kun tuta kohorto).

**6. Personon aŭ objekton, al kiu estas direktita ago aŭ sento. Ekz.:** Li levis siajn okulojn kontraŭ la junan virinon. Ŝi frapis sin kontraŭ la pordon. Mi estas maljusta kontraŭ neniu. Ili estis tro fieraj por defendi sin kontraŭ malveraj kalumnioj. Kiel vi agos kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ vi. Obeemaj ni estu kontraŭ la Eternulo, ĉar Li estas ĉiam gracoplena kontraŭ ni.

**7. Personon, al kiu estas direktata malamika, malfavora ago. Ekz.:** Kaino leviĝis kontraŭ sian fraton kaj mortigis lin. En Irako polaj soldatoj iras milite kontraŭ teroristojn. Mi havas nenion kontraŭ vi, kvankam vi ofte grumbas kontraŭ ĉio. Ĉiuj protestis kontraŭ arbitra agado de la estraro. Laboristoj grandnombre estis kontraŭ direktoro. La hundo ĉiam bojas kontraŭ fremdulo.

**8. Objekton aŭ aferon, al kiu estas direktata malhelpa, defenda, ŝirmanta ago. Ekz.:** Donu al ili panon, kontraŭ ilia malsato. Kontraŭ malfeliĉo baro ne ekzistas. Mi estas asekurita kontraŭ akcidento. Dubo gardas kontraŭ risko. Ĉiutaga gimnastikado estas la plej efika rimedo kontraŭ diversaj malsanoj.

Por ŝirmi sin kontraŭ la suno ŝi aĉetis pajlan ĉapelon. Li estas ĉiam por kaj eĉ kontraŭ io. Ne ekzistas

efika antaŭrimedo kontraŭ la ajdoso.

**Rimarkoj:**

a) Oni skribas: **batali kontraŭ** la morto (la fajro la inundo, la sorto), sed **batali por** la triumfo de ESPERANTO (aŭ **pro** la ideo de la lingvo internacia).

b) La prepozicio **kontraŭ** estas uzata ofte **post la verboj:** gardi, kaŝi, savi, ŝirmi, ribeli, konspiri, indigni. **Ekz.:** Gardu vin kontraŭ malbona virino. Li savis la filon kontraŭ danĝero. Ŝi ŝirmis la okulojn kontraŭ tro akra lumo. Lia spirito ribelis kontraŭ la tiutempe reganta doktrino. Multaj poloj konspiris kontraŭ stalinisma sistemo. Ni ĉiam indignas kontraŭ pseŭdofanoj.

**Vortfarado kun la prepozicio kontraŭ:**

- **kontraŭa** = troviĝanta kontraŭ iu aŭ io: Ŝi loĝas en la **kontraŭa** domo. Li venis al ni de la **kontraŭa** flanko. Tio estis **kontraŭa** al la kristana konduto.

- **kontraŭe** = en kontraŭa pozicio aŭ direkto: Mi loĝas en la **kontraŭe** troviĝanta domo. Ili agas **kontraŭe** al ĉia konveneco.

- **kontraŭi** = havi kontraŭan volon: Ŝi **kontraŭis** al ĉiuj miaj proponoj. Ili **kontraŭis** al ĉiuj progresemaj politikistoj.

- **kontraŭulo** = homo apartenanta al kontraŭa partio, kontraŭbatalanta ion;

- **kontraŭeco** = eco de io kontraŭa: Videblas profunda **kontraŭeco** inter du politikaj sistemoj en la mondo.

La prepozicio kontraŭ funkcias ankaŭ kiel prefiksoido, havante diversajn signifojn:

a) kontraŭiri, kontraŭnaĝi, kontraŭkuri = iri, naĝi, kuri kontraŭdirekte;

b) kontraŭbatali, kontraŭstari, kontraŭagi, kontraŭdiri, kontraŭparoli, kontraŭefiki, kontraŭrigardi = batali, stari, agi, diri, paroli kontraŭefike, malamike;

c) kontraŭmeti (meti kontraŭa); kontraŭjeti, kontraŭiĝi; kontraŭi (esti kontraŭa);

d) kontraŭvola (kontraŭ volo); kontraŭmilita, kontraŭpozicia,

e) kontraŭflanke, kontraŭnature, kontraŭvizaĝe, kontraŭflue,

**Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio kontraŭ el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:**

- Al li ne mankas defendo kontraŭ ofendo.
- Batali kiel fiŝo kontraŭ glacio. Bataladi kontraŭ la sorto.
- Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno.
- Eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko.
- Kontraŭ homo fiero Dio estas severa.
- Kontraŭ doloro ĉiam helpas bona humoro.
- Kontraŭ forta mano la leĝo estas vana.
- Kontraŭ kalumnio helpas nenio.
- Kontraŭ volo de Dio helpas nenio.
- Kontraŭ malfeliĉo ne defendas eĉ riĉo.
- Ne defendas oro kontraŭ doloro.

## Komunikoj

Lige kun la XX datreveno de perforta forigo (puĉo) de demokratio elektita Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio estas preparata dokumenta prilaboro, analizanta tiujn negativajn fenomenojn en vasta spektro: fono, cirkonstancoj, ligoj inter parto de E-aktivularo kun komunistaj instancoj de tiama PRL (Pola Popola Respubliko). Estas ankaŭ konsiderataj sekvoj de tiu danĝera evento, kiu ĝis nun malbone influas la polan E-movadon.



Pro la eventoj, okazintaj en Bjaliŝtoko en 2002 j (publikigo de „malkovroj” de s-ro Zb. Romaniuk, publikigitaj en „Studia Podlaskie” kaj daŭrigitaj en „Kurier Poranny” n-ro 1/2003), kaj ĉio posta, okazinta pro nepripensa disvastigado de „novaĵoj”, kaj damaĝoj de tio kaŭzitaj, mi preparas abundan prilaboron s.t.: „Odpowiedzialność w moralnym aspekcie badań historycznych. Uwagi na marginesie „odkryć” Zbigniewa Romaniuka” (Pri respondecado kaj morala aspekto de historiaj esploroj. Rimarkoj margene de „malkovroj” de Zbigniew Romaniuk). La prilaboro estis sendita por publikigo al la redakta komitato de „Studia Podlaskie”. La afero estas tre grava por estontaj esplorstoj de la Esperanto-movado kaj oni esperu, ke „SP” publikigos la tekston en sia signifa, scienca revuo.

**Zofia Banet-Fornalowa**

# La Movado...

Sube kelkaj materialoj kaj raportoj el okazintaj en Pollando gravaj eventoj. Mankas pli abundaj informoj pri la Vilna UK — ties partoprenintoj certe na ŝatas skribi...

## KĘTY — sukcesa aranĝo

### Etimata Samideano!

Mi dezirus informi Vin, ke la 14an de aprilo 2005 okazis solena malfermo de la Esperanta Ekspozicio:

ESPERANTO LA LINGVO DE PA-  
CO KAJ AMIKECO

en la Kultur-Domo en la urbo Kęty, kiun prezentis la Esperanto-Klubo „Espero”.

Partoprenantaj gastoj kiuj i.a. honorigis la solenan malfermon de la E-ekspozicio:

la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (PEA) el la urbo Gliwice, s-ro Stanislaŭ Mandrak, esperantistoj de la Filio de PEA el la urbo Bielsko-Biała kun la prezidantino, s-ino Bożena Gierula kaj la prezidantino de la Filio, s-ino Elizabeta Idzior, esperantistoj el la urbo Andrychów, s-roj: Francisko Kowalczyk, Johano Słowiński kaj la geklubanoj de nia E-Klubo „Espero”.

Reprezentantoj de la Distrikta Starostejo el la urbo Oświęcim:

la Sekciestro pri Klerigado kaj Kulturo s-ro Kristoforo Walus, la Sekciestro pri Promocio, Kulturo kaj Sporto s-ro Georgo Chrzyszcz, la Sekciestro pri Klerigado kaj Kulturo de la Urba Oficejo en la urbo Kęty s-ro Zbigniew Jarosz.

La prezidanto de Literata Grupo „Vorto” s-ro Stanislaŭ Sikor.

Dum la E-ekspozicio estas prezentitaj la landoj: Litovio, Japanio, Meksiko, Ĉeĥio, Finnlando, Koreio, Irano, Serbio, Nederlando, Francio kaj Norda Dakoto el Ameriko.

La dua parto de la solena renkonto okazis en la Kamera Salono en la Kulturdomo. Unue mi prezentis aktivecon de nia E-Klubo „Espero”. Poste mi rakontis pri nia E-ekspozicio.

Ĉio komenciĝis de kunlaboro kun la Japana E-Klubo en la urbo Okayama la 4an de junio 2004.

La E-Klubo havas sidejon en la Privata Sanyo Knabina Lernejo en la urbo Okayama. Tiam mi ricevis la proponon de la japana prezidantino, estimata s-ino Husako Harada de la E-Klubo, ekspozicii pri nia urbo Kęty kaj nia E-Klubo „Espero”. Dank’ al la iniciativo de la prezidantino, nia E-klubo „Espero” prezentis E-ekspozicion, kiu okazis la 11an de septembro 2004 en Okayama.

Nia E-Klubo estis prezentita en la temoj:

- la urbo Kęty
- la aktiveco de la Kultur-Domo
- la aktiveco de la Memvolontula

Fajrobrigado

- la Societo de Handikapuloj kaj iliaj Proksimuloj kaj Geamikoj „Unu al Dua”

- la renkonto kun germana esperantistino estimata s–ino Margarete Bettman en la Kultur–Domo kaj en la Societo „Unu al Dua”

- la renkonto kun la prezidanto de „Radio Bielsko” s–ro Georgo Handzlik.

Tiam mi promesis, ke mi ankaŭ organizos la saman E–ekspozicion en la Kultur–Domo en la urbo Keŭty. Do mi komencis skribi per retroŝto mesaĝojn al diversaj eksterlandaj Esperantaj organizoj kaj kluboj pri organizata E–ekspozicio. Finfine nia ekspozicio vere sukcesis.

Al ĉiuj Estimataj Geamikoj mi estas tre dankema en la nomo de la geklubanoj de la E–Klubo „Espero”. Koran dankon!!!

Mi deziris kaj pruvis al aliaj, ke dank’ al Esperanto, dank’ al la Estimataj Esperantistaj Geamikoj kaj la reto mi scipovis mem organizi la E–ekspozicion.

Plenestime kun amikaj salutoj

La prezidanto de la Esperanto–Klubo „Espero”

**Czesław Gluza**

## **KONCIZA RAPORTO PRI LA 27a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO**

En la tagoj 15–23 de junio 2005 jaro okazis en Mielno (PL) la 27a Ĉebalta Esperantista Printempo, kun riĉa kaj varia E–programo. Pri inter-

nacia karaktero de la aranĝo atestis naciaj flagoj de 8 landoj, el kiuj venis gesamideanoj. Ekspozitaj ekstere ili gaje flirtis en la vento, ornamante samtempe blankajn panelojn, sur kiuj videblis verdkoloraj surskriboj: **Ĉebalta Esperantista Printempo kaj Eŭropa Unio bezonas la lingvon Esperanto.**

La honorprotektecon super la aranĝo plenumis d–ro Mirosław Mikietyński (Prezidento de Koszalin) kaj mag. Zbigniew Choiński (Komunumestro de Mielno).

Impresplena estis la solena inaŭguro de la aranĝo, partoprenita ankaŭ de koŝalinaj gesamideanoj kaj de kelkaj honoraj gastoj, inter kiuj troviĝis Stanisław Mandrak, prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA.

La kunvenintojn varmege bonvenigis Czesław Baranowski, prezidanto de E–Filio en Koszalin, kiu jam la 15–an fojon sinsekve zorgis pri organiza kaj esenca flankoj de la aranĝo. En la inaŭgura parolado li esprimis sian grandan ĝojon pro la renkonto kun malnovaj kaj novaj gesamideanoj. Poste sekvis distra parto de la solenaĵo, dum kiu

plaĉajn kantojn en Esperanta kaj pola lingvoj prezentis al ĉiuj junulina kantensemblo el Koŝalina Kulturcentro.

La saman tagon vespere okazis tradicia, interkona vespero. Gaja danco kaj kantado daŭris ĝis noktomezo. Koŝalina muzikisto Stanisław Stokrocki plaĉe ludis orkestrionon kaj bele kantis popularajn kantojn en la lingvo internacia.



La sekvontan tagon komenciĝis realigo de riĉa kaj varia ĈEP-programo, en kiu troviĝis i.a. interesaj prelegoj, renkontoj, videofilmoj, ĉiutaga lingvo-perfektigado kaj lernado de E-kantoj ĉe akordiona akompano, fare de Urszula Giercarz.

Tre interesa estis la prelego „Lingvaj problemoj en Eŭropa Unio”, preparita de Stanisław Mandrak kaj prelego kun videofilmo „750 jaroj de Kaliningrado”, prezentita de nia honora gasto Halina Gorecka (RU). Ŝi interese rakontis ankaŭ pri la redaktado de „La Ondo de Esperanto”, montrante kelkajn ekzemplerojn de la revuo kaj multajn Esperantajn librojn, kiujn ŝi ankaŭ kunportis al Mielno.

Agrablan surprizon faris al ĉiuj Gunter Ebert (DE) pro interesa videofilmo farita dum la 89a UK de Esperanto, kaj pro sia muzikprelego nomita „Printempo en muziko”. Multe da ĝojo kaj kontento donis al ĈEP-partoprenintoj la societa loterio TOMBOLO, dum kiu ĉiu ricevis unu lotaĵon (utilan, galanterian aŭ bagatelan artiklon).

Tre atrakciaj estis du ekskursoj al KOSZALIN-STRZEKĘCIN kaj al KOŁOBRZEG, kiu estas vaste konata en Eŭropo pro la saniga mikroklimato, pro multaj mineralaj fontoj kaj pro sia riĉa historia pasinteco. Tie preskaŭ ĉiuj faris duonhoran marvojaĝon sur la ferdeko de stiligita motorboato SANTA MARIA.

La vetero ĉi-jare favoris al ĈEP-paroprenintoj. Dum liberaj antaŭtagmezoj ĉiu havis okazon por rege-

neri sian sanon dum aktiva ripozado: promenado, biciklado, naĝado, sunumado ktp. Neforgeseblajn impresojn lasis post si ankaŭ adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado kaj gaja kantado. La lastan tagon, dum tradicia sumigo de la aranĝo, ĉiuj esprimis sian grandan kontenton pro la organiza flanko de ĈEP, pro la riĉa E-programo kaj pro neripetebla Esperantista etoso. Poste sekvis kisado kaj ĝisado antaŭ forveturo hejmen.

**Jam estas decidite, ke la 28a ĈEP okazos denove en Mielno en la tagoj 13–20 de junio 2006 jaro.**

Detalaj informoj kun ĈEP-aliĝilo troviĝas jam en la vitrino de koŝalina Filio de PEA:

[www.esperanto.koszalinskie.info](http://www.esperanto.koszalinskie.info)



## **Pola NESTO**

Jam de kelkaj semajnoj ĉiumarde aperanta en Kędzierzyn-Koźle regiona revuo ECHO GMIN anoncas jenan lernovolontigon: „Ucz się: [www.monda.org/nesto/nesto-pl.htm](http://www.monda.org/nesto/nesto-pl.htm)”. Temas pri la volontigo de la lernado de Esperanto por gepoloj enkadre de la projekto de Amerika Komisiono de UEA, kiel elektronika longdistanca lernado laŭ la kurso disvolvita de Carlos Pereira.

La kurso estas disponebla senpage en interreto, en la retejo:

[www.cursodeesperanto.com.br](http://www.cursodeesperanto.com.br)

La gelernantoj, kiuj ekvolos ler-

ni Esperanton laŭ tiu metodo, en-  
skribiĝas rete kaj ricevas perretan in-  
struiston. La amerika oficejo de UEA  
en Brasilo donas al ĉiu lernanto la  
virtualan instruiston, kiu loĝas en la  
sama urbo aŭ regiono de loĝado de  
lernant(in)o. Krom la helpo en in-  
struado de Internacia Lingvo tiu in-  
struisto socialiĝas kun siaj gelernan-  
toj kaj eĉ renkontiĝas kun ili.

En Pollando ĝis la 3a de marto  
2005 laboris 8 geinstruistoj: Stani-  
sław Mandrak el Gliwice, Andrzej  
Kiszkiel el Lubsko Lubuskie, Halina  
Ejsmont el Tuszyn apud Lodzo, Jerzy  
Walaszek el Sosnowiec, Grzegorz Je-  
żewski el Varsovio, Stanisław Rawiak  
el Garwolin, Stanisław Śmigielski el  
Kędzierzyn-Koźle kaj Waldemar (la  
nomo malanoncita) el Rzeszów. Por  
anonci sian personan disponeblecon  
kiel tia reta instruist(in)o de NESTO-  
lernado plenu rete anoncilon en la  
retejo:

[www.ameriko.org/nesto/inst](http://www.ameriko.org/nesto/inst).

Ĝis komenco de marto 2005 la  
baznivelan kurson (KaPe) finis 135  
gelernantoj kaj la meznivelan (Ger-  
da) 28 gelernantoj.

Por ke venu al NESTO-retejo kaj  
komencu lerni Esperanton laŭvicaj  
novaj gelernantoj vi ankaŭ povas per  
ĉiuj eblaj metodoj informi pri tiu ler-  
nejo de ILo, eĉ provante serĉi eble-  
con publikigi en via regiona revuo aŭ  
en loka radio la anoncon pri tiu po-  
la NESTO (la retadreson ekvidu je la  
komenco de tiu teksto apud la infor-  
mo pri la anonco en ECHO GMIN).

**Stanisław Śmigielski**

## **Karaj Gekolegoj!**

Kun granda plezuro mi volas infor-  
mi vin, ke dum la UK en Vilno mi prez-  
entis koncizan informon pri la pro-  
jekto NESTO kaj radio NESTO

Ĝi okazis marde la 26an de julio  
en la 6-hora bloko de „Tago de lerne-  
jo”. Ni memoras, ke ĝuste en tiu  
tago esperantistoj festis la 118an  
datrevenon de la apero de la unua  
E-lernolibro.

Mia dekkelk-minuta prezentado  
elvokis intereson inter kelkdeko da  
partoprenantoj. Oni demandis pri la  
projekto, pri miaj spertoj en kunla-  
boro, pri eblecoj de lernado ktp. Pre-  
zentadon mi ricevis rekte el Brazilo  
de la administrantoj de projektoj.

Dankon al Adonis kaj Marsjo pro  
la bone preparita help-materialo.  
Kelkaj personoj petis min kopii la  
prezent-materialon, kion mi faris  
kun plezuro.

Amike

**Stanislavo Mandrak  
pola helpanto de la projekto NESTO**



Dum la UK en Vilno al du famaj  
poloj, nome red. Andrzej Pettyn kaj  
red. Roman Dobrzyński estis atri-  
buita Honora Membreco de UEA.  
Tiu fakto elvokis tujan reagon de kel-  
kaj anonimaj poloj, kiuj esprimis sian  
kontraŭan sintenon, publikigitan aŭ  
komentitan poste i.a. en la *Heroldo  
de Esperanto* kaj la reta *Libera Folio*.

Sendepende de „pola bruo”, ni gra-  
tulas al ambaŭ kolegoj la honorigon!  
En la venonta numero de PE ni publi-  
kigos tekstojn pri ili ambaŭ. [KL]

## Al la partoprenantoj de la 61a Internacia Junulara Kongreso

Estimataj Gesinjoroj, Karaj Junaj Amikoj,

Mi kore salutas ĉiujn partoprenantojn de la 61a Internacia Junulara Kongreso. Mi kun plezuro akceptis honoran patronecon super ĝi.

La lingvo kreita antaŭ pli ol jarcento de varsovia kuracisto, doktoro Ludoviko Zamenhof, estis kreita por plifaciligi interkompreniĝon de la monda komunumo. Por ke en rilatoj interhomaj kaj internaciaj efektiviĝu etoso de amikeco kaj paco. Hodiaŭ ni scias, ke tio estis ideo bonega kaj treege utila. Esperanto evidentiĝis taŭga por interhoma dialogo — ĝi estas neŭtrala, ne estas heredaĵo aŭ posedaĵo de ajna grupo, nek celas anstataŭi naciajn lingvojn. Alivorte — ĝi donas al ĉiuj egalajn ŝancojn.

Mi ĝojas, ke la vicoj de Esperanto-parolantoj senĉese kreskas kaj ke la Lingvo Internacia gajnas ĉiam pli fortan influon en la mondo. Ja la homoj, kiuj scipovas Esperanton, renkontiĝas ne nur pro la interliganta ilin komuna hobbio, sed ankaŭ por pli bone interkonatiĝi, kune malkovradi diversajn morojn, tradiciojn, ankaŭ revojn. Por kune paroli pri la estonteco.

Ĝojigas min ankaŭ tio, ke ĉi-foje la junaj esperantistoj kiel lokon por sia tutmonda renkontiĝo elektis Pollandon — la patrujon de la kreinto de tiu lingvo. La landon, al kiu viaj idealoj estas ege proksimaj. Mi esperas, ke ekplaĉos al Vi nia lando, tradicioj

kaj nuntempo. Ke vi prenos hejmen agrablajn rememorojn.

Mi deziras al vi fruktodonajn diskutojn, utilan interŝanĝon de spertoj kaj estigon de novaj amikecoj. Ĉion plej bonan!

**Aleksander Kwaśniewski**

(tradukis: Bolesław Strzelecki)



## Festparolado de la Direktoro de la Tatra Nacia Parko (eldirita Esperantlingve)

**Karaj Gesinjoroj** — partoprenantoj de la 61a Internacia Junulara Kongreso, kaj invititaj gastoj! Mi deziras saluti vin ĉiujn nome de Tatra Nacia Parko ĉi tie, piede de Tatroj, en Zakopane — loko aparte signifoplena por tiu ĉi kongreso.

Dum multaj jarcentoj la montaro per sia potenco, majesteco kaj severeco izolis naciojn kaj dividis komunumojn, kiuj vivis ĉe ĝiaj piedoj. Dum evolado de nacioj formiĝis apartaj lingvoj, kiuj aldone baris senperajn kontaktojn.

Nuntempe la montaro ne plu dividas, sed kunigas per sia beleco, pro kiu ĉiujare pilgrimas ĉi tien homamasoj de aliaj mondopartoj. La beleco de montaraj pejzaĝoj kaj la montara naturo parolas senvorte kaj estas kompreneblaj por ĉiuj.

Oni tamen deziras komuniki siajn impresojn pri tiu ĉi loko sen ajnaj baroj, same universale, kiel oni spertis ilin. Oni deziras interkompreniĝi per unu komuna lingvo komprenebla por ĉiuj. Tia estas la lingvo de tiu ĉi

kongreso — Esperanto.

Karaj Gesinjoroj, dum la kongreso vi ekkonos ankaŭ Tatrojn. La montaron, kiu dum pli ol 50 jaroj, por gardi ĝian belecon kaj naturon, estas komune protektata de du nacioj — pola kaj slovakaj. Dank' al la iniciato kaj helpo de la organizantoj de tiu ĉi kongreso, vi ricevis esperantlingvan flugfolion pri Tatra Nacia Parko.

Mi deziras al vi fruktodonan laboron kaj, konsiderante la universalan lingvon Esperanto kaj la universalan belecon de la montaro, mi kredas, ke Via kongreso kontribuos al pliintensiĝo de kunlaboro kaj estigo de novaj rektaj kontaktoj.

Stanisław Czubernat



## Intervjueto

Mi interparolas kun...

— Anna Bichta  
nomata ankaŭ...

— Anuś

el **Varsovia Vento**, kompreneble. Kion vi opinias pri preskaŭ finiĝanta jam IJK?

— Fakte estis multe da laboro, kaj mi pensas, ke ni estis preparitaj bone por ĉiuj aferoj. Komence ni pensis, ke venos pli multe da homoj; ne ĉiuj venis, bedaŭrinde. Tamen mi opinias, ke estis bona etoso, kaj ĉiuj venintoj al Pollando estas feliĉaj.

Sed tamen estas sufiĉe granda nombro da partoprenantoj, ĉu?

— Jes, nun estas 445 personoj konfirmintaj sian alvenon, kaj mi pensas ke ankoraŭ venos kelkdeko da ili.

El kiom da landoj ili venis?

— Nun estas partoprenantoj el 49 landoj, kaj pro tio ni estas ege feliĉaj, ĉar estas vere internacia, interkultura etoso.

Kaj la sekva demando eble estos por vi iom stranga: kion vi planas post la Kongreso, rilate vian esperantistan agadon?

— (ridetante) Fakte ni ne havis tempon por pripensi tion antaŭ IJK, sed certe ni tion faros post la Kongreso. Sed mi pensas, ke ni okupiĝos grandparte pri PEJ, kie ni senlace agas, kaj tio estas la plej grava.

Ĉu vi, kiel spertaj jam organizantoj, havas eble la ideon helpi al malpli junaj gekolegoj el PEA organizacie ekkreski?

— Ni estas tro junaj por diri, kion faru pli maljunaj ol ni.

(ridetante) Ĉu vere? Ankoraŭ unu demando: ĉu PEJ, aŭ pli precize: la **Varsovia Vento**, volus utiligi la ŝancon ekhavi kelkajn proprajn paĝojn en **Pola Esperantisto**?

— Certe en venonta jaro, kvankam ni havas propran revuon „**Tornado**”!

Jes, kompreneble, sed nur en pola lingvo. Do ni havu esperon, ke venontjare, kiam vi havos pli multe da tempo, nia kunlaboro pliriĉiĝos, ĉu?

— (ridetante) Jes, jes, kompreneble!

Dankon por mallonga intervjuo!

— Koran dankon!

intervjuis:

IJK—partoprenanto n—ro 630

## **Ne ebla? Ni igas ĝin ebla**

(fragmentoj de la prelego aŭdigita dum la Internacia Junulara Kongreso en Zakopane)

[...] **Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo**

Tio estas slogano de Oomoto kaj mi kredas, ke se tiu spirito influas la mondon, tio estos la ŝlosilo por realigi veran mondacon. 'Unu Dio' signifas kunlaboro inter ĉiuj religioj, se mi simple klarigas, kaj 'Unu Mondo' estas fariĝi organizo kiel Eŭ mondo-skale. Alivorte, kunlaboro kun monda federalisma movado. Do, bv. legi mian libreton kiam vi havos liberan tempon. Hodiaŭ, mi parolas nur pri „Unu Interlingvo”. [...]

### **Oomoto instruas subajn principojn**

Mi volas citi „Ni devas esti ĉiam en harmonio, en la mondo konsistas el multaj kontraŭstarantoj, tamen ni devas harmoniiĝi, anstataŭ batali”. [...]

Per forto nur grandiĝas venĝemo. Potenculoj celas akiri petrolon kaj armila-komercistoj gajnas nekredeble grandegan profiton, interŝanĝante lagon da sango de mortintoj, kaj suferadas multegaj homoj kiuj perdis marnojn, gambojn kaj okulojn ktp. [...]

Paco venos nur per diskutado kaj bezonas longan toleremon. En la mondo kunloĝas multaj kontraŭstarantoj, sed ni devas harmoniiĝi, anstataŭ batali.

### **Mia celo por veni al Zakopane**

Mia vera celo por veni ĉi tien estas gravaj petoj al vi ĉiuj. Bonvole vidu Esperantujon precize kaj profunde per viaj junaj okuloj. Maja revuo „Esperanto” indikis ke la plej furora E-libro estas „Vojaĝo en E-lando”, la vendado dum 4 jaroj estas 1.672 ekzempleroj, kaj la 2a furoraĵo estas via „Pasporta Servo”, vendiĝis 1.636 ekzempleroj en la tutmondo. Ĉu ĉiuj ne pensas iom strange? En la tuta mondo 1.672 kaj 1.636? Mi pensas, ke tie mankas almenaŭ 1 nulo, eĉ 10 aŭ 100 nuloj.

Kaj individuaj membroj de UEA estas nur iom pli ol 5 miloj, kaj antaŭ kelkaj jaroj daŭre malgrandiĝis, sed nur lastjare multiĝis je 142 personoj ĝis 5.856. Tie mankas almenaŭ 1 nulo ankaŭ. Tio estas mia vidpunkto. Tio spegulas ke ni estas kiel malgranda urbeto, kvankam Majstro Ludoviko inventis epokfaran internacian lingvon E-o por 6 miliardoj da homoj.

Mi forte kredas ke finfine ne-anglaj parolantoj ne akceptos doni eternajn privilegiojn al anglaj parolantoj en Eŭ. Tio influos al ĉiuj landoj kaj la mondo sekvos Eŭropon. Do, ni povus ĝui kaj kredi nian finvenkon. Se ni finvenkos, mondanoj ne kredos kiel malforta movado ni estas.

En la libro „La Zamenhof-strato” mia amiko Romano skribis jene: „Nia majstro Ludoviko diris 3 gravajn aferojn por nia internacia lingvo”.

1-e, estu eksterordinare facila,

2-e, ĉiuj kiuj ellernas ĝin, tuj kompreniĝas kun homoj de aliaj nacioj,

3-e, kiel venki la indiferecon de la mondo.

Ludoviko jam realigis la 1an kaj la 2an punkton. Sed bedaŭrinde, nur pri la 3a, li ne sukcesis. Mi vekigis pri tiu punkto. Se ni evitos indiferecon en Eŭropa Unio, ni povus havi grandegan ŝancon.

Bedaŭrata s-ino Klara Zilbernik — certe ĉiuj konas ŝian nomon, (ŝi estis la edzino de Ludoviko) estis la ĉefa viktimo de lia idealismo. Lia konvinkado donis al ŝi senfinan ĉenon de penigaj klopodoj kaj malriĉo. En la jaro 1890, Ludoviko konfesis letere al lia amiko, ke: „Mia situacio atingos krizan staton”. Kaj ili devis translokiĝi al kamparo el Varsovio pro malriĉo. Mi profunde konsideris la situacion de la tiama familio Zamenhof. Mi legis la libron „La Zamenhof-strato” 3-foje, kaj ĉiam mi... (mi haltigis prelegon iom da tempo dum mia plorado). Sed feliĉe naskiĝis E-o por eterna mondo, malgraŭ la nekredeble malfacilaj kondiĉoj.

Laste, mi petas al ĉiuj aŭskultantoj: kolektu 10 novajn esperantistojn kaj aligu ilin al TEJO kaj ankaŭ al UEA. Mi petas. Bonvole propagandu Esperanton al viaj geamikoj, familianoj, kolegoj kaj infanoj. Se vi sukcesos, nia komunumo 10-obligos, ene de 3 jaroj, 2 jaroj aŭ 1 jaro? Bonvole kunlaboru tiel, ke ni bezonos multege da E-instruistoj por la mondo. Se eŭropanoj ne donos privilegiojn al anglaj denaskuloj en Eŭropa Unio, tio

influos al la mondo samtempe. Tiam, multege da E-instruistoj necesas tra la mondo. Ni povus kontribui grandiozan kaj epokfaran eventon por eterna mondo. Naskiĝo de Eŭropa Unio estas la sola ŝanco en la homara historio. Ni havas nur unu ŝancon dum kelkmil jaroj.

Kaj oni povus vidi ke post nia egaligo, oni ekdiskutos pri vera monda paco. Onisaburo DEGUĈI aŭguris en la jaro 1945 ĵus post la Dua Mondmilito ke Japanio, spertinta nuklean bombon, havos grandan mision por kontribui al la monda paco. Se efikos nia klopodo, iam malaperos armiloj el la mondo.

Esperanto donos ŝancon egalrajte diskuti. Oni ekkonsideros pacon kaj atingos forpeli armilojn. Kaj ĝi liberigos nian komunikadon.

Sinsekvaj spiritaj gvidantinoj de Oomoto asertadas, ke se E-o ne estos monda komuna lingvo, ni ne atingos mondan pacon. Tial, mi ĵetis mian tutan energion por plenumi ĝin. Kaj mi daŭre atakos indiferecon en Eŭropa Unio per la reklamo-kampanjo.

Bv. multigi nian komunumon dekoble per viaj junaj povoj. Mi forte kredas, ke viaj diligentaj agadoj influos al via najbarejo, kaj poste al viaj landoj, tio influos al tuta Eŭropo, kaj finfine E-o atingos la tutan mondon. Koregan dankon, por aŭskulti silente kaj diligente mian erarplenan paroladon. Mi profunde petas al vi ĉiuj: kolektu kaj kaptu 10 novajn E-istojn, E-amantojn kaj E-movadistojn. Koregan dankon. ♣

## Memorvortoj pri E-agado de forpasinta Adamo Goralski–Pawlikowska

Sinjoro Adamo Goralski–Pawlikowska tre meritplena esperantisto mortis en Poznań — Pollando post longa malsano en la aĝo de 93 jaroj.

Konante 6 lingvojn li ekinteresiĝis pri Esperanto en 1975 jaro. Li finis fundamentan kurson en Poznań kaj daŭrigan ĉe la Laguna Universitato en Tenerifo — Hispanio en 1978/79. Poste memlernante li perfekte ekregis la lingvon. Pro sia longajara laboro en Venezuelo kiel kemiisto li fariĝis nemulte vidanta. Bedaŭrinde post sinsekva okuloperacio jam entute perdis vidkapablon. Sinjoro Adamo komencis aktive laboris per Esperanto por esperantistaro tutmonde surbendigante artikolojn, skeĉojn, interparolojn, muzikon. Dum 12 jaroj dissendadis la bendojn al blindaj samideanoj doverslande.

**Kiel fondinto de Antoni Grabowski–Fondaĵo ĉe UEA** celis monpremioj talentajn, junajn esperantistojn, partoprenantojn de la belartaj konkursoj.

Longjare li agadis kaj subtenadis E-asocion en Caracas–Venezuelo, kaj E-asocion en Tenerifo la Laguna. Malavare subtenis grafikan centron en Antverpeno. Riĉe provizis la muzeon en San Pablo de Ordal Hispanio/Katalunio kies fondinto estis samideano D.L.M. Hernandez Yzal.

La biblioteko en Poznana E–Asocio pliriĉiĝis per pluraj, valoraj libroj dank’ al s-ro A. Goralski. Multjare

subtenadis infanajn kongresetojn, organizataj samtempe kun Universalaj Kongresoj.

Okaze de la centjariĝo de Esperanto en 1987 j. en Graz–Aŭstrio estis starigita ŝtonmonumento kies malkovron plenumis s-ro Ivo Lapenna ĉe multnombra esperantistaro kaj ĉeesto de gesinjoroj K.A. Goralski. Por realigi tiun okazaĵon s-ro A. Goralski grandparte monsubtenis la starigon de la monumento.

En la jaro 1996 s-ro A. Goralski ricevis la titolon „Honora membro de UEA”.

S-ro A. Goralski dediĉis sian tempon, laboron, monon ne por ricevi distingojn, aplaŭdojn, sed agadis por subteni esperantistaron tutmonde.

Li mortis en privata kliniko en Poznań la 11.06.2005 kaj estis enterigita en Poznana tombejo la 23.06.2005.

Sinjoro Adamo Goralski meritas esti eternigita en historio de Esperanto kiel plej fervora aganto kaj subtenanto de E–movado.

**Dank’ al helpo de s–ino Kristina Goralska — la tekston prilaboris s–ino Halina Oleszek (Poznań)**

P.S.

Sinjinino Kristina, la edzino de s-ro A. Goralski (ankaŭ bona esperantistino, laŭprofesie artpentristino) dum 31 jaroj de la geedziĝo estis por sia edzo Adamo fidela kaj pacienca akompanantino en ĉiutaga vivo kaj dum tre oftaj vojaĝoj lektoro, vido, legisto, skribisto, kaj ĝis lasta lia vivmomento sindona zorgantino.

# ESPERANTO - TEATRO "ESPERO"

De Jerzy Fornal

Sidejo: Art.-Galerio "Nusantara" str. Nowogrodzka 18a tel.(22)629-24-41  
e-mail: <jerzy.fornal@raszyn.pl> ret.paĝ:<http://www.teatr.raszyn.pl>

Prezentoj okazas kutime: ĉiun unuan lundon de monato je la 17-a h.

Antaŭ spektakloj, je la 16-a h.okazas konversacia rondo pri temoj:  
Esperanto-kulturo, kaj enkonduko al la spektakloj.

Gvidas ĝin ZOFIA BANET-FORNALOWA kaj invititaj GASTOJ.

## LA REPERTUARIO de la E-TEATRO "ESPERO" POR LA – SEZONO: 2005/06

- 5- IX– 05 Einstein - konfeso el Ŝeolo - monodramo verkita de Gunnar Gällmo, -  
prozo kun klasika muziko, plenumas J.Fornal
- 3- X 05 Wolfgangerl - monodramo pri drama vivo de Wolfgang Amadeus  
Mozart - verkita de Gunnar Gällmo, surscenigo kaj plenumao J.Fornal
- 7- XI 05 Tajdoj de l'vivo - „Brando”, laŭ monologo de Emilija Lapenna:  
surscenigo kaj plenumo. J.Fornal
- 5- XII 05 Sopiro-Laboro-Espero – poezi-muzika spektaklo, bazita je poemoj kaj  
eldiroj de d-ro L.L.Zamenhof en plenumo kaj surscenigo de J.Fornal.
- 2- I 06 TROMPO laŭ monologo de Emilija Lapenna. Surscenigo kaj plenumo de J.Fornal
- 6- II 06 - La Granda Koncerto - muzik-pantomim-vorta distra spektaklo, prilaborita de  
J.Fornal
- 6- III 06...Virino – kvar bildoj – poezi-muzik-pantomima teatraĵo, konsistanta el poemoj de  
E.Mieželaitis, B.Leŝmian, F.G.Lorka, S.Jesienin, P.Corneille, W.Auld, Reĝo Salomono.  
Elektis kaj surscenigis J.Fornal
- 3- IV 06. – .Prikanti la homan sopiron – poezi-muzika spektaklo bazita je poezio de  
Zdzisław Łączkowski. Tradukita el la pola de Kris Long. Surscen. kaj plenumo J.Fornal
- 8- V 06 — La petskribo - monologo laŭ S.Mrozek. Esperantigis Lidia Ligeża.  
Surscenigo kaj plenumo J.Fornal
- 5- VI 06.. La arlekono - laŭ rakonto de Janusz Korczak.- tradukis:Bejot. Surscenigo  
kaj plenumo J.Fornal

---

**BONVENON AL NIA TEATRO!**

**ZAPRASZAMY DO TEATRU W JEZYKU ESPERANTO!**

Karaj amikoj! De Via ĉeesto kaj apogo dependas la sukceso kaj disvastigo de nia  
E-teatra kulturo.La spektantoj pagas nur enirbileton al la Art-Galerio "Nusantara"  
Widzowie placą tylko bilet wstępno do Galerii.